

N. N. 32,
Rozbranĉo
forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

*Traduko de la Germana poemo
"Es ist ein Ros entsprungen" de
N. N. 32 en Esperanton de Felix
Ney.*

Arg-618-1246 (2012-10-18
22:27:59)

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas
en la retejo [http://www.
reocities.com/cigneto/
thctxt/r/rozbranĉo1.html](http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranĉo1.html).*

N. N. 32,
Elkreskis roz-
branĉeto

*tradukita de Joachim
Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto'
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

*Traduko de la Germana
poemo "Es ist ein Ros ent-
sprungen" de N. N. 32
en Esperanton de JOACHIM
GIESSNER (*1913-12-23 -
†2003-11-25).*

Arg-618-1244 (2012-10-18
21:24:22)

*Tiu ĉi poem-traduko tro-
viĝas en [http://www.
esperanto.de/kantoj/
index-giessner.html](http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html).
sub [http://www.
esperanto.de/kantoj/
kantoj.pdf](http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf).*

N. N. 32,
A spotless roze is growing

tradukita de N. N. 33

1. A Spotless Rose is growing,
Sprung from a tender root,
Of ancient seers' foreshowing,
Of Jesse promised fruit;
Its fairest bud unfolds to light
Amid the cold, cold winter,
And in the dark midnight.

2. The Rose which I am singing,
Whereof Isaiah said,
Is from its sweet root springing
In Mary, purest Maid;
Through God's great love and might
The Blessed Babe she bare us
In a cold, cold winter's night.

*Traduko de la Germana poemo "Es ist
ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en la
Anglan de N. N. 33.*

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

*Tiu ĉi traduko troviĝas en [http:
//ingeb.org/spiritua/
esistein.
html](http://ingeb.org/spiritua/esistein.html).*